Ozike revenis kun Huĉi. La antaŭan tagon, vespere, Ozike permesis al li vidi sian mastron dormantan, sed evidente vivantan. De tiam li ne malproksimiĝis de la ĉaro de Ozike. Li dormis sub la ĉaro de Ozike. Li dormis sub la ĉaro, envolvite en sia kabato. Frumatene, li ĉeestis la transportadon de Ĉan. Kompreneble li ne kuraĝis rimarkigi sin, sed kiam la dekestro gardista elvenis kaj rakontis al la gardistoj, ke la sinjoro pardonis al ili, kaj ke li fartas tre bone, Huĉi iris malantaŭ la ĉaron de Ozike kaj ekdancis. Li estis ankoraŭ dancanta sian venkodoncon manĉuran, kiam Ozike lin vokis. Li alkuris kvazaŭ malsatiga hundo. Nun li staris antaŭ sia sinjoro kaj liaj okuloj plenis je larmoj.

«Ordonu, mastro!» li diris. Ĉan lin rigardis severe. Huĉi ekkonsciis pri sia eraro:

«Ordonu sub-tumanestra moŝto!» Tiam Ĉan ekridetis.

«Sanon, Huĉi! Kiel fartas la ĉevaloj?»

«Perfekte, moŝto, sed la grizulo, kiu ĉeestis la... la... akcidenton multe malkvietiĝas. Mi jam diris al ĝi ke la mastr... la subtumanestra moŝto fartas bone, sed ĝi ne kredas min. Ĉu mi rajtas ĝin konduki ĉe la lukon, por ke ĝi vidu la moŝton? Ĝi estus tiel feliĉa...» Ĉan ekridis kaj la tuta ĉeestantaro imitis lin. Huĉi malaltigis la kapon ruĝiĝante. Li ne komprenis kio estis ridiga en liaj paroloj.

«Dankon, mia knabo!» diris fine Ĉan. «Ci bone edukas la ĉevalojn. Nun, aŭskultu min! Mi donacas la bejulon...» Huĉi ekpaliĝis. Li volis krei: «ne la bejulon, mastro, ne la bejulon!» sed ne kuraĝis diri ion. Li rigardis la pintojn de siaj botoj. Ĉan rekomencis paciencen: «Min rigardu Huĉi, ne la plankon! Ci ne perdos la bejulon. Mi ĝin donacas al damo Erenjke, kiu savis mian vivon kaj perdis sian ĉevalon.» La vizaĝo de Huĉi reprenis kolorojn. La mastro pravas: li prizorgas ankaŭ la ĉevalojn de la tri damoj de la tendo de la mastro, do li povas kunvivi kun la bejulo kiel antaŭe. Cetere, damo Erenjke rajdas bone, eĉ se iom brutale. La bejulo ne estos tro malfeliĉa. «Dankon, mastro!» li balbutis, provokante ĉi-foje la ridon de Erenjke. «Dankon, mia sinjoro,» diris ŝi serioze kvankam ŝiaj okuloj brilis pro gajeco. «Edzino kiu faras simple sian devon ne meritas donacon.» «Tiel estas,» sentencis Ĉan, «sed per tia ĉevalo mi volas honori cian patran moŝton kaj liajn tikojn. Ci havas la bejulon. Amu ĝin, tiom kiom Huĉi!»

*Kabato* : ŝafpelto uzebla kaj kiel pelerino (haroj ekstere) kaj kiel kovrilo (haroj interne).

*Tumanestro* : generalo komandanta dek mil rajdistojn.

*Tikoj* : hunoj el malgrandaj triboj nomadantaj en nord-ŭesta Hunio.

**T**chan, prince chinois du 3<sup>ème</sup> siècle avant notre ère, a émigré chez les Huns et épousé Oziké, qui est devenue la Première épouse, très aimée.

Mais elle a convaincu son mari de prendre, selon la coutume, d'autres épouses, toutes aimées, même si c'était à des niveaux différents. Un jour, la troupe de Tchan traverse un défilé, et Ereïnké, la Seconde épouse, ayant vu un danger, lance son cheval entre Tchan et Oziké. C'est son cheval qui reçoit la flèche et Tchan est blessé, mais pas tué. Houtchi, esclave de 16 ans de Tchan d'origine mandchoue, est très estimé pour sa compétence pour s'occuper des chevaux, qui ont une telle importance dans cette civilisation nomade. Mais comme Tchan a choisi le cheval bai, celui-ci est devenu très cher au jeune esclave.



Oziké revint avec Houtchi. La veille au soir, elle l'avait autorisé à voir son maître endormi, mais bien vivant. Depuis lors, il ne s'était pas éloigné du chariot d'Oziké, avait dormi dessous, enroulé dans sa pelisse. À l'aurore, il avait assisté au rapatriement de Tchan. Bien évidemment il n'avait pas eu le courage de se faire remarquer, mais quand l'officier de garde était revenu et avait raconté aux sentinelles que le seigneur leur pardonnait, et qu'il se portait très bien, Houtchi alla derrière le chariot d'Oziké et se mit à danser. Il s'adonnait encore à sa danse mandchoue, celle du vainqueur, quand Oziké l'appela. Il accourut comme un chien affamé. A présent, les yeux pleins de larmes, il se tenait debout devant son seigneur.

«À vos ordres, Maître!» dit-il. Tchan le regarda avec sévérité. Houtchi prit conscience de son erreur : «À vos ordres, mon général!». Alors Tchan se mit à sourire. «Porte-toi bien, Houtchi! Comment vont les chevaux ?» «À merveille, mon général, mais le gris, qui était là lors de... de... l'accident est très inquiet. J'ai eu beau lui dire que le maîtr..., le général allait bien, il ne me croit pas. Suis-je autorisé à le conduire à la lucarne de la tente, pour qu'il voie le général ? Il en serait tellement heureux...»

Tchan se mit à rire, et toute l'assemblée avec lui. Houtchi baissa la tête en rougissant. Il ne voyait pas ce qui était risible dans ce qu'il avait dit.

«Merci mon petit !» dit enfin Tchan. «Tu prends bien soin des chevaux. À présent écoute-moi ! Je donne le cheval bai...» Houtchi pâlit. Il aurait voulu crier : «pas le bai, Maître, pas le bai !» mais n'eut pas le courage d'émettre le moindre son. Il fixait le bout de ses bottes. Tchan reprit avec patience :

«Regarde-moi, Houtchi, lève les yeux ! Tu ne vas pas perdre le cheval bai. Je le donne à dame Ereïnké qui m'a sauvé la vie et a perdu son cheval.» Le visage d'Houtchi reprit des couleurs. Le Maître avait raison : il s'occupait aussi des chevaux des trois épouses qui partageaient la tente du Maître, il pourrait donc continuer à s'occuper du bai comme auparavant. Et puis dame Ereïnké était bonne cavalière, même si elle était un peu brusque. Le bai ne serait pas trop malheureux. «Merci, Maître !» balbutia-t-il, provoquant cette fois le rire d'Ereïnké. «Merci mon Seigneur», dit-elle avec sérieux, mais ses yeux brillaient de joie. «Une épouse qui n'a fait que son devoir ne mérite pas de récompense». «Telle est ma volonté» conclut Tchan, «car par ce cheval je veux honorer Monsieur ton père et sa tribu hunnique\*. Tu auras le bai. Aime-le autant que le fait Houtchi.

*Tribu hunnique* : le père de Ereïnké appartient à une petite tribu de Huns.

Traduction Anne JAUSIONS

## Post la lerneja tago

### TAPi aŭ NAPI, interesaj spertoj

**E**n mia norda regiono ni ferios venontan semajnon, do hieraŭ estis la lasta leciono en vilaĝo Willems, kiu situas tute apud Belgio.

La 27 infanoj entuziasme travivis tiun sperton. Ilia plezuro, ĝojo kaj kompetento estis videblaj kaj la urbestro fiere partoprenis preskaŭ la lastan duonon de la lasta leciono, ĉar fakte estis li, kiu invitis min por «instrui» Esperanton.

### 5 lecionoj, po 1h15 ĉiumarde fine de la lernotago

La infanoj ne havas la elekton inter diversaj temoj kiel en Villeneuve d'Ascq, kie mi ankaŭ «TAPas aŭ NAPas».

Iu junulo Gautier, dungita de la urbo, responsas pri la grupo, bone konas ĉiujn infanojn kaj partoprenas la diversajn agadojn. Li miris pro la laboro farita kaj la nivelo atingita de la infanoj, kaj ĉefe pro la fakto ke eĉ kutimaj «pigruloj» bone partoprenis.

Infanoj ludas, parolas, respondas al la demandoj, kantas, ripetas frazojn, kolorigas ktp.

### Mi kelkfoje rekompencas iun per komunaj aplaŭdoj aŭ JEFO-kalendaretoj

Ili konservas ĉion en iu dosiero, kaj mi kelkfoje rekompencas iun per komunaj aplaŭdoj aŭ JEFO-kalendaretoj. Triopo eĉ inventis kanzonon, kiun ili nepre volis prezenti al siaj amikoj, kompreneble ankaŭ poste al la urbestro.

La trian mardon, mi ne estis libera kaj ne volis rezigni pri la leciono, do mi trovis agrablan kaj kompetentan ins-

truistinon Dorinne, kiu bone anstataŭis min kaj - alia miraklo laŭ mi - pretas daŭrigi venontjare tiun instruadon eble en Lille ĉar la urbo petas volontulojn por zorgi pri NAP.

La alia grupo en Villeneuve d'Ascq: la infanoj havas la elekton inter teniso, teatro kaj Esperanto... Imagu !

Kvankam mi vizitis 3 klasojn por prezenti la lingvon, nur 8 infanoj elektis ĝin kaj mi ĉefe devas aperi kiel

grumblanta avo pro disciplino.

5 + 7 lecionoj, po 1h30 ĉiuĵaŭde, sama programo sed se la vetero bonas, sporta kaj kompreneble lingva paŭzo sur la korto ĉar 90 minutoj longas por tiaj infanoj jam iom lacaj fine de la lernotago. Ili saltas, kuras, ĵetas kaj kaptas la pilkon, sportumas lernante diversajn verbojn kaj agadojn.

Michel Dechy

## Amiko foriris

### Un ami disparu

**J**acques Joguin n'est plus, frappé par un infarctus. Une cérémonie d'adieu a eu lieu à Grenoble le 14 décembre en présence de sa famille et d'une forte délégation espérantiste.

Nous tous, espérantistes, sommes fiers d'un ami qui a porté très haut l'idéal humaniste de l'espéranto, notre langue, ce lien d'amitié et de fraternité. Toute sa vie, Jacques s'est donné pour faire avancer cet idéal. Il a d'abord acquis un très haut niveau de maîtrise et de connaissance de l'espéranto, non seulement pour satisfaire sa curiosité intellectuelle, mais avec le souci permanent de donner, de transmettre, de partager son savoir. Il donnait des cours, il a écrit des ouvrages. Son ouvrage « Parlons espéranto » est une grammaire de référence. Il a animé en qualité de président l'association « Espéranto-Grenoble » pendant de longues années. Il a été membre du bureau national d'Espéranto-France et membre du Comité de l'Association internationale des scientifiques espérantophones. Il a organisé des rencontres et manifestations, et participé à de nombreux congrès espérantistes. Il était encore présent au



Congrès Mondial de Lille l'été dernier. Sur le plan professionnel, Jacques a été d'abord professeur agrégé de physique dans l'enseignement secondaire, puis il est devenu professeur dans l'enseignement technique supérieur à l'IUT de Grenoble.

Nous avons perdu un ami, un éclaireur, un véritable humaniste.

Nous te devons beaucoup, merci Jacques !

Nous étions jeudi, tous rassemblés devant le nouveau panneau du Funéraire, qui porte l'article premier des Droits de l'Homme en espéranto, juste à l'entrée !

Au revoir Jacques ! Ĝis revido !

Eo-Grenoble 18-12-2015

## Franca akademiano forpasis

# Forpasis akademiano kaj membro de Franca Esperanto-Instituto Michel Duc Goninaz

**A**ntaŭ 10 tagoj mi ĉeestis en Le Puy-Sainte-Réparate (apud Aix-en-Provence, Francio) tutan vesperon dediĉitan al Victor Lebrun, iama sekretario de Tolstoj: malkovro de ŝildo ĉe la estonta mediateko, honorvino, malfermo de ekspozicio, prelego (vidu la artikolon p. 4). Ĉeestis proksimume 50 homoj, inter kiuj estis Michel kaj lia edzino Arlette. Li ankaŭ kontribuis al libro «Passion Tolstoï» eldonita tiuokaze. Li ne tre bonfartis, (malvarmumo?), aspektis laca, tamen kiam hieraŭ je la 21.20 telefonis al mi esperantistino el Aix, ke Michel forpasis antaŭ horo, mi estis tre ŝokita. Michel-on mi konis de jardekoj. Kiam li

alvenis en Aix-en-Provence li tuj vizitis min, kiu siatempe loĝis tie kun miaj gepatroj. Mi estis tre feliĉa, ke kune kun li ni petis instruadon de Esperanto en la nove memstara universitato (post la eventoj de 1968 la kondiĉoj ŝanĝiĝis kaj eble fari tiajn proponojn; mi estis ankoraŭ studentino, kaj akompanis lin ĉe la estro de la universitato).

Kaj la instruado en tiaj bonaj kondiĉoj daŭris 26 jarojn. Ni vidis lin poste de tempo al tempo ĉu en Aix ĉu okaze de renkontiĝoj, ekzemple en Kvinpetalo.

Ni perdis homon, kiu grave kontribuis al la nova eldono de Plena Ilustrita Vortaro. Ni perdis akademianon, kiu grave kontribuis al Esperanto, sed ĉefe ni perdis

agrablan kaj lertan homon.

Kiam mi vidis lin tiun vendredon mi certe ne supozis, ke tio estos la lasta fojo. Mi funebras.

Miaj sinceraj kondolencoj iras al Arlette kaj al lia tuta familio. (verkita la 27an de marto).

C. Nourmont

Omaĝe al li, jen poste teksto, kie li klarigas, kiel li alvenis al Esperanto. Tiu teksto estis verkita por la revuo Komencanto, kiu afable akceptis, ke mi publikigu tiun tekston en LME.

## Kiel tio komenciĝis ?

**K**iel tio komenciĝis? Por respondi tiun demandon, ne sufiĉas rakonti personajn rememorojn kaj paroli pri Esperanto. Necesas ja kompreni historian situacion kaj la rolon de diversaj lingvoj.

**1933-40 : «Unu lingvo sufiĉas».** Mi denaske vivas en unulingva medio. Mi probable eĉ ne imagas, ke ekzistas surtere aliaj lingvoj, ol tiu, kiun uzas miaj familianoj kaj ĉirkaŭaj ceteraj homoj, t.e. la franca.

**1940-44 : «Mi malkovras aliajn lingvojn, elpensas lingvon tutmondan kaj ekscias pri Esperanto».** Alia lingvo aperas en Parizo. Ĝi estas parolata de la germanaj soldatoj. Ĝi estas skribata sur dulingvaj afiŝoj, anoncantaj la ordonojn kaj decidojn de la germana stabo. La unua fremdlingva vorto, kiun mi tiamaniere lernas, estas «Bekanntmachung», kiun mi ja ne kapablas analizi («sci-igo»), sed kiun mi opinias tre longa kompare kun la samsignifa franclingva «Avis». Mi do konatiĝas

kun tiu lingvo per la traduka metodo. Por sepjara knabotamenrestas nesolvebla problemo : homoj ja povas paroli alian lingvon, ol mi, sed en kiu lingvo ili pensas? Ŝajnas al mi neeble pensi en alia lingvo, ol la franca. Sed venas

aliaj informoj per la lernejo, la radio kaj la politikaj informoj. Mi ekscias, ke ekzistas angloj, kiuj parolas angle, rusoj — ruse ktp. Iĝas pli kaj pli klare, ke mi ne povos devigi ilin paroli france. Mi eĉ malkovras, ke la mencio «Made in France», videbla sur kelkaj objektoj, estas anglalingva — kial do? Krome, mi ekscias, ke iuj homoj, kiujn mi aŭdas paroli france kaj estas konsiderataj francoj, parolas «inter si» en alia lingvo. En Parizo estas multaj tiaj homoj, precipe bretonoj. Ankaŭ la malfeliĉaj judoj,



ĉiutage insultataj de la nazia propagando kaj deportataj en 1942, havas laŭdire sian propran lingvon. Estas do ne nur multaj lingvoj, sed du specoj da ili : tiuj, kiujn oni uzas oficiale (la franca, la germana, la angla k.a.) kaj tiuj, kiujn oni uzas «inter si» (la bretona, la jida k.a.). Pro tiu revolucio en mia infanca mondkoncepto (mi ankoraŭ ne konis la vorton Weltanschauung!), mi faras al ĉirkaŭaj plenkreskuloj la demandon : «Sed ĉu ne ekzistas iu lingvo komuna por ĉiuj homoj?» kaj mi ricevas la jenan

respondon (de mia patrino, se mi ĝuste memoras) : «Ho, jes, ekzistis Esperanto, sed ĝi malsukcesis». Mi ne komprenas, kiel lingvo povas «malsukcesis», ĉar nur poste mi ekscios, ke lingvoj aperas kaj malaperas. Tamen mi povas konstati, ke tiu informo estas ne tute ĝusta. En strateto tute proksima al mia lernejo troviĝas kafejo, sur kies vitrino videblas verda stelo kun la skribaĵo «Esperanto parolata». Do, ekzistas tamen homoj, kiuj uzas tiun lingvon, kiu «malsukcesis»! Mi ne aŭdacis eniri la trinkejon por informiĝi. Finfine, tio estas problemoj por plenkreskuloj. Kaj mi ankoraŭ ne konsciis, kiom simbolaj estas miaj unuaj scioj pri fremdaj esprimoj : «Bekanntmachung», «made in France» kaj «Esperanto parolata».

**1944-46. «Mi renkontas Esperanton».** Parizo ĵus liberiĝis. Mi ekvizitas mezlernejon kaj devas elekti unuan fremdan lingvon. Mi elektas la germanan. Pro kio? Ĉu pro tio, ke ĝi jam ne plu estas tute fremda; aŭ pro tio, ke mia patrino siatempe lernis ĝin kaj povos min helpi; aŭ pro tio, ke ĝin elektas malplimulto (unu sesono de la lernantoj), do iaspeca elito? Mi dubas, ĉu eĉ psikanalizisto donus taŭgan klarigon, sed nia instruisto pri la germana lingvo jene aprobas nian elekton en sia inaŭgura leciono: «Vi estas malmultaj, ĉar la germana lingvo estas malamata. Ĉar la milito ankoraŭ ne finiĝis, mi povas argumenti, ke scii la lingvon de la malamiko estas utile. Sed precipe pensu pri la estonta paco kaj via nepre estonta amikeco kun la junaj germanoj, viaj samaĝuloj, kiuj ne respondecas pri la abomenaĵoj, kiujn ni travivis aŭ pri kiuj ni ĵus eksciis.» Du jarojn poste, mi eklernas la anglan. Intertempe mi, laŭ instigo de nia instruisto, korespondas dulingve kun juna germano, kiu lernas la francan lingvon. Sed okazas io alia. Mi rimarkas, ke nia instruisto pri historio kaj geografio, s-ro Robert Gérard, surportas insignon kun verda stelo. Mi memoras pri la verda stelo kun «Esperanto parolata» kaj konjektas, ke li estas

unu el la malmultaj parolantoj de tiu lingvo, kiu laŭdire «malsukcesis». Mia konjekto montriĝas ĝusta. Iun tagon li proponas, ke ni korespondu kolektive kun alilandaj klasoj por interŝanĝi informojn kaj dokumentojn pri niaj respektivaj landoj : tiu korespondado okazos en la lingvo Esperanto, kaj li klarigas al ni, kio ĝi estas. Li proponas instrui ĝin al dezirantoj, ekster la devigaj programoj. Kun kelkaj samklasanoj mi sekvas lian kurson dum du jaroj kaj eĉ trapasas la unuagradan ekzamenon de Franca Esperanto-Instituto. Ni komencas la planitan korespondadon, kreas klubon kun biblioteko, abono al La Juna Vivo, tiama organo de TJO (nun TEJO) ktp. Ni havas ankaŭ personajn korespondantojn. Oni hazarde atribuis al mi korespondantaron en la Finnlanda urbo Turku/Åbo. Per tiu hazardo mi eksciis, ke en tiu urbo estas uzataj du lingvoj, la finna kaj la sveda kaj tial la urbo havas du nomojn. Pripensinda fakto, ĉu ne?

### 1949. Mi partoprenas la renkonton de TJO en Versajlo, apud Parizo.

Mi parolas flue kun gejunuloj el pluraj eŭropaj landoj. La partoprenantaj junaj kimroj klarigas al ni, ke ili ja estas britoj, sed ne «angloj» kaj parolas sian propran kimran lingvon, kiun ili eĉ aŭdigas. Miaj ideoj pri la rilatoj inter lingvoj kaj politikaj fenomenoj pli kaj pli klariĝas. Unu nederlanda partoprenantino restas postkongrese unu plian semajnon en Parizo. Mi ŝin ĉiĉeronas ĉiutage. Ŝi jam bone scipovas la francan lingvon, sed ni parolas nur en nia komuna Esperanto.

Mi haltas ĉi tie. Mi povus rakonti, kiel mi fariĝis instruisto de la rusa lingvo, sed tio estus ekstertema. Tiu somero de la jaro 1949 restas por mi senŝanĝe sunoplana kaj probable pro ĝi mi estas ankoraŭ nun esperantisto, adepto samtempe de komuna homa lingvo kaj de egaleco inter ĉiuj lingvoj de ĉiuj popoloj.

Michel Duc Goninaz

(ARTIKOLO APERINTA EN KOMENCANTO, 2005, AFĪSITA DE VOST, URAL-SIBERIA ESPERANTISTA MOVADO)

## en bref ● mallonge

### ● KOMITATO KAJ ESTRARO

*Dum la kongreso en Marsejlo estis diskonigitaj la novaj komitato kaj estraro de Espéranto-France.*

• Ekde la 7<sup>a</sup> de majo 2016, komitatanas Alexandre André, Sylvain Barrier, Pierre Bouvier, Jeanne-Marie Cash, Raymonde Coquisart, William Dumoulin, Bruno Flochon, Xavier Godivier, Didier Janot, Aleks Kadar, Christian Lavarenne, Didier Loison, Sébastien Montagne, Armelle Piolat, Anne-Emilie Ravache, Emmanuelle Richard, kaj la reprezentantoj de la federacioj kaj de la fakaj asocioj.




• Jen la estraro ekde la 8a de majo 2016 : estis elektita kiel prezidanto Aleks Kadar, vicprezidantoj William Dumoulin, Didier Loison (pri eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado) kaj Bruno Flochon (pri kongresoj), kasisto Anne-Emilie Ravache, vickasisto Sébastien Montagne, ĝenerala sekretario Sylvain Barrier.



## Entretien

# Rencontre avec Greta Franclet : « Nul en langues, plus jamais ! »

**E**xpolangues- Février 2015, Espéranto-France tient un stand dans ce prestigieux salon et comme nous sommes nombreux à le tenir, nous pouvons nous libérer un moment pour assister à des conférences. Greta Franclet va de stand en stand et propose la présentation de son livre : « Nul en langues, plus jamais. » Son regard lumineux, son sourire, sa voix claire et le titre du livre, tout m'attire et à l'heure dite je me rends dans la salle où un public nombreux a pris place. Greta expose clairement le contenu et le but de son livre : pour un apprentissage agréable et efficace d'une voire de plusieurs langues étrangères. De nombreux applaudissements saluent son intervention et le débat commence. Je laisse une ou deux personnes poser des questions puis je demande l'autorisation de venir face au public devant la tribune- réflexe d'enseignante mais aussi pour plus de visibilité pour le public. Je reprends l'un des points développés par la conférencière, l'importance de l'écoute et je souligne le grand avantage d'une langue qui est



entièrement phonétique...laquelle ? je souhaite que le public fasse des propositions et c'est alors que j'entends le mot « espéranto » accompagné de sourires amusés : j'ai complètement oublié que j'ai sur moi le badge du stand et qu'il suffisait de le lire pour donner une/la réponse. C'est aussi l'occasion de dire que l'espéranto vit toujours ! Suite à cette rencontre une correspondance



s'installe entre l'auteure et moi-même et bientôt Greta Franclet me dit qu'elle a ouvert un dossier espéranto puis elle m'annonce qu'elle souhaite ajouter un chapitre dans son livre numérique. C'est ainsi que dans l'édition de février 2016 figurera un chapitre « et pourquoi pas l'espéranto ? »

Je vous invite fortement à découvrir ce livre et si vous en faites l'acquisition informez Greta que vous êtes espérantistes et faites-lui part de vos réactions.

**Monika 05**

## Bouresse atendas vin

# Mia unua kvinpetala vizito

**P**laĉis al mi la familia etoso. Kvin dometoj ĉirkaŭas ĝardenon, la lokoj rapide varmiĝas, la komforto sufiĉas al mi. Claude kuiradas, uzante laŭeble lokajn produktojn. La staĝantoj lavas la vazaron.

La komunaj manĝoj estas bongustaj, abundaj kaj faciligas la konversaciojn inter la partoprenantoj.

Plaĉis al mi la atento por plibonigi la esperantan nivelon de ĉiuj staĝantoj :

Ni ĉefe parolis en Esperanto. Nur kelkaj francaj vortoj aŭdiĝis por ripozigi la

komencantojn.

Ansofi' pacienco proponis diversajn agadojn laŭ la nivelo de ĉiu lernanto. La esperantaj revuoj, libroj abundas. Bernard prelegis en Esperanto pri ekologia ĝardenumado.

Brian promenigis la staĝantojn tra la urbeto Bouresse kaj per Esperanto komentis la diversajn interesajn lokojn (preĝejon, tombejon, stratojn, domojn...).

Mi revenos !

**Martine**

*Nul en langues, plus jamais! Guide pour réussir. Greta Franclet. 219 pages, Editions Carrefour du Net*

*Un livre original, très intéressant, comprenant un plaidoyer convaincant sur l'utilité de l'apprentissage des langues étrangères et un guide pratique avec des méthodes, des ouvrages, des adresses, une bibliographie.*

*Il y a là « des pistes concrètes pour donner naturellement le goût des langues aux enfants sans passer par la traduction ».*



## Kial mi fariĝis azilpetanto en Francio ?

**K**araj samideanoj, mi rakontas mian historion rilate mian travivadon kiel soldato kaj policisto en Demokratia Respubliko Kongo.

En 1981 mi eklernis Esperanton danke al sinjoro Ngangu Ndotoni Bakidila Antoine. Urbo Lukala estas mia naskiĝloko en Bas-Congo. Bas-Congo estas nun Centra Provinco de DR Kongo. Kiam mi lernis Esperanton, mi estis internulo en urbo Kimpese je 25 kilometroj de Lukala, sinjoro Ngangu estis instruisto en unuagrada lernejo en Lukala. Mia familio loĝas en Lukala ĝis nun, kiel lernanto en Kimpese mi havis tempon por lerni Esperanton nur dum la feriaj tagoj.

Mi sukcesis mian abiturientecon en 1981 kaj mi vojaĝis al Kisangani en la orienta provinco je 2000 kilometroj de Kinŝaso, la ĉefurbo de DR Kongo. Tie mi studis en Agronomia Fakultato, intertempe mi profitis krei Esperantan klubon (Kisangania Esperanto-Klubo). Sinjoro Hans Bakker (paco al lia animo) helpis min akiri lernolibrojn. La plimulto de la membroj de la klubo estis studentoj, do post la fino de la studoj ili foriris al Kinŝaso.

Krom mia universitata studo, mi daŭrigis lerni Esperanton per korespondado. De 1981 ĝis 1996 mi estis en Kisangani kaj post mia finstudo, mi laboris kiel fiŝvendisto pro manko de laboro. En oktobro 1996 okazis milito en Kisangani kaj la soldatoj de Mobutu fuĝis el la urbo, ĉar ili aŭdis ke la ribelantoj proksimiĝas al la urbo Kisangani. Sinjoro Mobutu Sese Seko estis la dua prezidento de DR Kongo (eksa Zairio) post Joseph Kasa-Vubu.

Je la fino de 1996, en decembro, mi estis arestita de ruandaj soldatoj, perforte oni varbis min kun aliaj studentoj kaj infanoj. Mia arestado ne plaĉis al mi ĉar la ruandaj soldatoj pli multegis ol la zairiaj soldatoj, intertempe ili diris, ke ili estas AFDL (Alliance des Forces de Libération pour la République Démocratique

du Congo, kunigo de liberigaj fortoj por Demokratia Respubliko Kongo).

Ekde decembro 1996 ni veturis per kamiono al la vilaĝo Baliangoma, kiu estas tute en arbaro je 100 kilometroj de Kisangani, je 30 kilometroj de la flughaveno de Kisangani, nome Bangoka. En la arbaro oni preparis la manĝaĵon en barelo, la ĉefa manĝo estis seka maizo kun fazeoloj, kion oni boligis aldonante iom da oleo. Oni nomis tion mvunguré.

En aprilo 1997 oni veturigis nin per kamiono al la flughaveno Bangoka, oni ne diris al ni kien ni iros. La laborlingvo estis la svahila, la ruandaj soldatoj disŝiris niajn atestilojn kaj diplomojn. Lingala lingvo estis malpermesita, ni veturis per aviadilo Antonov, el rusa firmao kaj kondukis rusoj. En la aviadilo ni estis starantaj; post du horoj ni atingis Kamina Base en provinco Katanga. Tie ni trovis ruandajn soldatojn kaj tanzaniajn soldatojn, post unu semajno oni elektis nur tiujn kiuj studis por trejna kurso de la polico en Kinŝaso.

Kiam la 17-an de majo 1997, sinjoro Laurent Désiré Kabila sin proklamis prezidento, ni forlasis Kamina Base por Kinŝaso. Ni atingis Kinŝason nokte kaj

ni veturis per kamiono al la kampadejo Tshatshi. Ni restis tie nur unu semajnon kaj ni veturis al Maluku, la Instruista Centro de policistoj, tie ni trovis ugandan policiston kiel instruiston.

### En januaro 1998, mi finis mian polic-trejnadon

La dua parto de mia historio rilatas al mia laboro kiel policisto sine de la interna ministerio, kiun gvidis sinjoro Mwenze Kongolo. En januaro 1998, mi finis mian polic-trejnadon en la instruista centro de Maluku. Iuj policistoj finis sian trejnadon ankaŭ en Angolo. Kiam ni estis trejniĝantaj en la Instruista Centro de Maluku, aliaj iris al Angolo por la sama trejnado, kune ni formis brigadon nomatan Police d'Intervention Rapide (Polico por Tuja Interveno), mallonge PIR. La Brigadon gvidis sinjoro Patience Mushid-Yav; pinte de la Nacia Polico gvidis sinjoro Celestin Kifwa.

Okazis post nia trejnado problemo de loĝo, ĉar la Brigado konsistis el almenaŭ kvin miloj da policistoj. En organizo de nia polico, brigado konsistis el 5.000 policistoj, bataliono konsistis el 1.000 policistoj, kompanio





konsistis el 200 policistoj, roto konsistis el 50 policistoj, sekcio konsistis el 25 policistoj kaj skipo konsistas el 12 policistoj. Kolonelo gvidis batalionon, kapitano gvidis kompanion, leŭtenanto gvidis roton, adjudanto gvidis sekcion, kaporalo gvidis skipon. La Ĉefa Generalo gvidis la tutan policon. Kompreneble estas aliaj sub-rangoj, kiujn mi ne menciis: fakte, se la respondeculo de la grupo mankis, la suba rango anstataŭis por gvidi. Do, la problemo konsistis el tio, ke ni estis multnombraj, la registaro ne trovis kampadejon por ni, finfine oni loĝigis nin en la domoj de la ekskunlaborantoj aŭ eksministroj de siatempa prezidento Mobutu, kiuj fuĝis el la ĉefurbo pro la milito.

Je la fino de aŭgusto 1998 okazis miskompreno inter la prezidento Laurent Désiré Kabila kaj du help-landoj, Ruando kaj Ugando. Ĝis nun ni ne scias la kialon de tiu miskompreno; iuj diras, ke temis pri la landlimo en la orienta parto de DR Kongo, ĉar la respublikestroj de Ruando kaj Ugando konsentis kun sinjoro Laurent Désiré Kabila ŝanĝi la landlimon de siaj landoj aldonante parton de DR Kongo.

Por via informo, la orienta parto de la DR Kongo enhavas multajn minaĵojn. Pro la malakcepto de sinjoro Laurent Désiré Kabila, la du landoj ribelis kontraŭ prezidento Kabila.

La prezidento decidis forigi la soldatojn kaj policistojn de tiuj landoj.

Tiel en julio 1998 mia bataliono vojaĝis al provinco Bandundu, unue al urbo Kikwit, poste en la ĉefurbo de la provinco por sekurigi la loĝantaron. Kompreneble nia ĉefa misio konsistis el serĉado de soldatoj kiuj fuĝis pro malkonsento kun la prezidenta decido. Ĉiuj soldatoj kiujn ni arestis, estis senditaj al Kinŝaso al la milita kortumo.

### Tie ni trovis la soldatojn nomatajn prezidentgardistoj

En decembro 1999 ni finis nian mision kaj reiris al Kinŝaso, tie ni restis nur unu monaton. Je la fino de januaro 2000, nia bataliono ree vojaĝis al Ankoro, la naskiĝvilaĝo de prezidento Laurent Désiré Kabila. Ni vojaĝis per aviadilo ĝis Lubumbashi, la ĉefurbo de provinco Katanga. Ni restis tie kvin tagojn atente

dante trajnon. Elektra trajno veturigis nin de la trajn-stacio de Lubumbashi ĝis la stacio de Kamina. De urbo Kamina ĝis vilaĝo Kitanda ni veturis per dizela trajno, de Kitanda ĝis vilaĝo Ankoro piede, estas 100 kilometroj. Vilaĝo Ankoro estas en teritorio Manono en provinco Katanga. Tie ni trovis la soldatojn nomatajn prezidentgardistoj (gardes présidentiels) kaj tanzaniajn soldatojn.

Kiam ni atingis Ankoro-n oni prezentis al ni la kunordiganton de la misio, nome sinjoron Bofate. Li estis kolonelo kaj de tempo al tempo rekte raportis al la respublikestro pri la okazaĵoj per satelit-radio. Li gvidis ankaŭ la prezidentgardistojn en Ankoro. Nia misio estis malpermesi al la ruandaj soldatoj okupi perforte la vilaĝon, ĉar ili jam estis en urbo Manono je 200 kilometroj de Ankoro. Multaj homoj de urbo Manono fuĝis militon kaj venis loĝi en Ankoro. La loĝantaro de Ankoro plimulte estas fiŝkaptistoj. Tie troviĝas rivero Lualaba. Tiu rivero estas la fonto mem de la rivero Kongo, kiu transiras preskaŭ la tutan landon ekde provinco Katanga ĝis provinco Bas-Congo, kie troviĝas la nacia haveno de DR Kongo. La sama rivero disigas la du ĉefurbojn de DR Kongo kaj Kongo Brazzaville. En tiu vilaĝo la etno nomiĝas Balubakati. Fakte mi konstatis dum nia deĵoro, ke la respondo al salutvorto malsamas laŭ la persono kiun vi salutas. Kiam oni salutas viron oni diras "wafwako" (= saluton) kaj la respondo estas "eyovidje" (= dankon), tamen kiam oni salutas virinon oni diras same "wafwako" sed la respondo de la virino estas malsama: "eyomwa" (= dankon). Pro la milito, la vilaĝanoj timis iri en la kampojn por serĉi maniokojn, tiam troviĝis multaj fiŝoj en la bazono tamen mankis kondimentoj, sed aliaj kuraĝaj virinoj malgraŭ la milito iris en la kampojn. La ribelantoj estis en alia flanko de la rivero. Por eviti la bombatakojn de niaj malamikoj, ni faris tranĉeojn niaflanke, du metrojn profunde - kiam mi marŝas ene mi estas nevidebla.

Kiam la ruandanoj kaj la ugandanoj atakis nin milite, la prezidento kreis

Force d'Autodéfense Populaire (popolaj memdefendantoj) mallonge FAP. Tiu konsistis el volontulaj junuloj kiuj fervore apogis la Nacian Armeon por defendi kaj protekti sian teritorion. En vilaĝo Ankoro la junuloj kiel armilojn uzis battranĉilojn, pafarkojn kaj sagojn. Krom tiuj armiloj, ili kolektis malplenajn boteletojn de penicilino kaj plenigis ilin je fetiĉa akvo. Ili portis ilin kiel medalionon per ŝnureto ĉirkaŭ la kolo. Laŭ ili tiuj boteletoj protektis ilin kontraŭ la kugloj de la malamikoj. Danke al ili, ili ne povis morti kiam oni pafis ilin. Dum la tuta periodo de la milito, al ĉiuj kiuj portis ŝnureton estis malpermesite seksumi kun sia partnero por konservi la povon de la fetiĉo; oni nomis ilin Mayi-Mayi. Kiam ni amikiĝis kun la junuloj de Ankoro, ili montris al ni strangan pulvoron por amuloj. Tiun pulvoron oni aplikas sur la viran seksorganon. Post unu horo la viro ne kapablas ejakuli. Kiam ni revenis al Kinŝaso, la pulvoro fariĝis tiom sukcesa, ke oni ĝis hodiaŭ parolas pri ĝi en Interreto. Hodiaŭ en Kinŝaso kiam vi parolas pri Ankoro, oni vidas rekte la seksan pulvoron. Post unu jaro en Ankoro, je la fino de decembro 2000, alia bataliono anstataŭis nin.

En la jaro 2001 ni revenis en Kinŝason, la ĉefurbon de DR Kongo. Nelonge antaŭe, la 16-an de januaro 2001 oni murdis Prezidenton Laurent Désiré Kabila, bedaŭrinde ĝis nun la kulpuloj estas nekonataj. Tamen post lia forpaso lia filo Joseph Kabila daŭrigis kiel respublikestro, ne plaĉante al aliaj politikistoj. Tial la Respubliko estis dividita, ribelantoj okupis la orientan kaj nordan partojn de la lando. Por solvi la konflikton, la internaciaj organizoj (UN, MONUSCO, EU ktp.) decidis ellabori transiran registaron gvidatan de kvin prezidentoj, en kiu Joseph Kabila estis la ĉefa gvidanto. Ĝi konsistis el: Joseph Kabila, Prezidento de la Respubliko, el PPRD (Parti du Peuple pour la Reconstruction et la Démocratie - Partio de la Popolo por Rekonstruo kaj Demokratio)- Abdoulaye Yerodia Ndombasi, Vicprezidento de

PPRD  
- Azarias Ruberwa, Vicprezidento de RCD (Rassemblement Congolais pour la Démocratie - Konga Kuninghoro por Demokratio)

- Jean-Pierre Bemba, Vicprezidento de MLC (Mouvement de Libération du Congo - Movado por Liberigo de Kongo)  
- Arthur Z'ahidi Ngoma el Opposition Démocratique (Demokrata Opozicio)  
Fakte, mia batalionestro elektis min por labori ĉe la vicprezidento Abdoulaye Yerodia Ndombasi, kiu zorgis pri la rekonstruado de la lando. Tie mi respondecis pri roto.

En junio 2005 mia onklo, kiu loĝas en mia devena provinco Bas-Congo skribis al mi leteron dirante, ke li estas informita pri mia nova laboro ĉe la vicprezidento, estas por li okazo laŭeble rendevui kun la vicprezidento. Mi demandis al li, kio okazas. Li diris al mi jene: kara nevo, ekde januaro 2001 ĝis nun, la soldatoj de

nia provinco okupas kelkajn ĉambrojn de mia hotelo, ili ne pagas, nun la sumo egalvaloras 17 159 Usonajn dolarojn. Ĉu via vicprezidento ne povas solvi mian problemon? Mi jam skribis al la guberniestro en Matadio, la ĉefurbo de nia provinco, sed vane. Mi proponis al li veni en Kinŝason por aranĝi rendevuon ĉe la vicprezidento. Bonŝance por li la vicprezidento akceptis lian rendevuon kaj skribis leteron al la



respondeculo de la provinco.

En marto 2006, kiam mi insiste reparolis private pri la sama situacio, kiu estis nesolvita, la ĉirkaŭantoj de la vicprezidento male ne konsentis mian intervenon kaj trudis al la vicprezidento forigi min de mia laboro; tuj mi estis arestita, ili taksis min maldisciplina, kiel policisto mi ne rajtas reagi. Finfine mi estis liberigita post ses monatoj kaj mi estis postenigita en nova brigado, kiu zorgis pri la gardado de oficialaj kaj publikaj ejoj.

En decembro 2013, iu pastoro nomata Joseph Mukungubile, kiu kandidatis en 2006 kiel respublikestro (bedaŭrinde li malsukcesis), skribis malbonan leteron al la respublikestro kaj instigis siajn anojn ribeli kontraŭ la nuna registaro. Ili komencis en Lubumbashi, la ĉefurbo de provinco Katanga, poste ili atakis la nacian radio-televidan stacion (RTNC) la 30an de decembro 2013. La nacia radio-televida stacio situas apud Palais du Peuple (Popol-Palaco) kaj la sportejo Stade des Martyrs (Stadiono de Martiroj) sed sine de la stacio estas la prezidentgardistoj kiuj laboras tie. En mia bataliono kelkaj policistoj laboris apud RTNC sed ne ene; ĉar mi respondecis pri ili oni kulpigis min pro tio, ke mi ne sendis policistojn por sekurigi la prezidentgardistojn dum la atako de anoj de Joseph Mukungubile. Do mi estas kunkulpanto, oni arestis min denove la 20an de aŭgusto 2014. Imagu, mi ne atendis tion. Finfine mi eskapis, miaj esperantistoj klopodis por ke mi foriru el la lando kun fidinda dokumento. Mi kredas, ke vi nun komprenas kial mi estas azilpetanto en Francio.

Victor Lufimpu



esperanto  
France

&

esperanto  
Ile-de-France

## atendos vin en Francilio!



ESPERANTO-KONGRESO

25-28 majo 2017

Mandres-les-Roses (94)



Asocia domo

Dormo-ĉambroj

Kongres-salonoj

Parkego (6ha)

Restoracio

Sportejoj

Turismo

Kokinoj!



Pli da informoj baldaŭ disponeblas... Vi povas ankaŭ sendi demandojn al [info@esperanto.paris](mailto:info@esperanto.paris)